# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-11-05 n-ro 346

# Indonezio: malkovro de nova specio de orangutango



Nova mistera kavaĵo estas eltrovita ene de la granda piramido de Gizo

Trompa mimiko. Ĉu sufiĉas rigardo por kompreni kio okazas en la homo?

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin [Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Indonezio: malkovro de nova specio de orangutango
*Sur la insulo Sumatro p. 03*

Nova mistera kavaĵo estas eltrovita ene de la granda piramido de Gizo
*Granda malplenaĵo interne de la piramido de Keopso p. 04*

Trompa mimiko
*La korpa lingvo decide kontribuas al taksado de emocioj de aliaj p. 05*

Hodiaŭe
*Hans Sachs; Mihail Sadoveanu; kaj Grekio p. 06*

# Indonezio: malkovro de nova specio de orangutango

Tio estas grava kaj neatendita malkovro. Nova specio de orangutango estis malkovrita sur la insulo Sumatro en Indonezio. Tiu orangutango, kies haroj estas krispaj, nomita *Tapanuli*, vivas en la regiono *Batang Toru*. Temas pri la unua nova specio konfirmita de la scienco de post 1929.



Jam en 1997, aŭstraliaj sciencistoj malkovris iliajn spurojn. La unuaj studaĵoj en 2013 pri la skeleto de virseksulo elmontras unikajn trajtojn, kompare kun la aliaj orangutangoj. Entute, tri specioj da orangutango estas konataj en la mondo. La laboro de la sciencistoj estas publikigitaj en la usona revuo *Current Biology* [Biologio Hodiaŭ].

Sed tiu nova specio estas aparte vundebla, atentigas la sciencistoj. Ilia populacio estas taksita je nur 800 membroj hodiaŭ.

«Okaze, se ok el tiuj 800 restantaj animaloj estus mortigitaj aŭ eksigitaj el la grupo ĉiujare, la specio povus malaperi», opinias la sciencistoj. Konsekvence, tiu specio de homedoj estas la plej minacata je estingiĝo sur la planedo: «Plu ekzistas minacoj de novaj vojoj, eventoj kiuj fragmentos tiun populacion, kaj kondukos al ties estingiĝo. En tiu regiono, la danĝero estas grava, kiel tiu hidroelektra programo antaŭvidita en la valo de la rivero Batang Toru, kie troviĝas la plej grava denso da orangutangoj», substrekas Ian Singleton, direktoro de la programo pri konservado de orangutangoj de Sumatro.

La arbaraj loĝlokoj de la orangutangoj Tapanuli limiĝas hodiaŭ je nur mil kvadrataj kilometroj.

En Sumatro, la arbaraj areoj malkreskis je 60% inter 1985 kaj 2007. La kialoj estas forstumadoj, minaj koncesioj kaj agrikulturaj plantejoj. Tiuj homedoj estas ankaŭ viktimoj de la kontraŭleĝa ĉasado.

La orangutangoj altas averaĝe 1,10 ĝis 1,40 metrojn kaj pezas 40 ĝis 80 kilogramojn. Ili vivas 30 ĝis 40 jarojn kaj malfacile reproduktiĝas, kun pluraj jaroj inter ĉiuj naskoj. Sen rapidaj aranĝoj por protekti iliajn arbarajn loĝlokojn, tiuj orangutangoj povus malaperi post kelkaj jardekoj.

Neniam Milito Inter Ni



# Nova mistera kavaĵo estas eltrovita ene de la granda piramido de Gizo

Aperis nova mistero rilata al la piramidoj de Egiptio: sciencistoj eltrovis ion, kio ŝajnas esti granda malplenaĵo interne de la piramido de Keopso, ankaŭ konata kiel la Granda Piramido de Gizo.

Ne estas sciate, kial la kavaĵo ekzistas tie, nek ĉu ĝi ŝirmas ion kun historia valoro, ĉar ŝajne ĝi ne estas alirebla tra la vojoj konataj ĝis nun.

Japanaj kaj francaj sciencistoj faris la anoncon, post kiam ili studis la komplekson de la piramidoj de Gizo, en la ĉirkaŭaĵoj de Kairo, dum du jaroj.

Ili utiligis teknikon nomatan muonografio, kiu estas multe uzata por studi vulkanojn kaj kiu povas detekti gravajn ŝanĝiĝojn de denseco en grandaj rokaj strukturoj.

Estante 146 metrojn alta, la Granda Piramido estas la plej granda el la pluredraj formaĵoj de Gizo, kaj estis konstruita dum la regado de la faraono Keopso, inter 2509 kaj 2483 a.K.

Fonto:
*https://www.terra.com.br/noticias/ciencia/nova-cavidade-misteriosa-e-descoberta-dentro-da-grande-piramide-de-gize,f394e831f7b942bf1e374aead59281c3h9qa2xq2.html*

Josenilton
jotakaeme.blogspot.com

# Trompa mimiko

Ĉu sufiĉas rigardo por kompreni kio okazas en la homo? Temas pri miskonkludo. Tion nun konstatis psikologoj. Precipe en kazo de ekstremaj emocioj la vizaĝa mimiko ne permesas konkludon pri tio ĉu sento estas agrabla aŭ ne. La korpa sinteno malkaŝas iom pli.

Doloro, ĝojo, funebro, ekstazo - ĉe ekstreme intensaj emocioj la vizaĝa mimiko ne malkaŝas ĉu la koncernaj homoj en tiu momento travivas ĝojon aŭ suferon. Anstataŭ tio la korpa sinteno pli bone esprimas kio okazas en la homo.



La korpa lingvo decide kontribuas al taksado de emocioj de aliaj. Ĝis nun la esploristoj supozis ke la vizaĝa muskolaro respegulas tre bone pozitivajn kaj negativajn sentojn - precipe ĉe ekstremaj emocioj. Studaĵo de psikologoj de la *Princeton* Universitato en Usono ne nur montras ke la mimiko estas grave supertaksata ĉe la kulmino de forta emocio. La testoj krome pruvas ke la vizaĝa mimiko eĉ ne permesas konkludojn pri tio ĉu forta sento estas agrabla aŭ malagrabla.

La esploristoj unue montris al tri grupoj de 15 testantoj fotojn de tenisaj profesiuloj kiuj en grava matĉo ĵus estis perdintaj aŭ gajnintaj poenton. Se la testantoj vidis nur la vizaĝon, ili apenaŭ povis indiki ĉu la atleto en tiu momento sentis ĝojon aŭ ĉagrenon. Se ili aliflanke vidis nur la korpon aŭ la korpon kaj la vizaĝon, tiam ili kapablis taksi la situacion esence pli fidinde. La testantoj ne konsciis pri tio. Ili havis la iluzion ke ĉio apogiĝas precipe sur la mimiko.

La decidan rolon de la korpa sinteno la esploristoj krome testis en dua eksperimento. Ili surmetis al la korpoj de gajnintoj de poentoj la vizaĝon de ludanto kiu ĵus estis perdinta poenton - kaj inverse. Kvankam la testantoj estis ricevintaj la klaran instrukcion konkludi pri sukceso aŭ malsukceso nur surbaze de la vizaĝa esprimo, ili tamen atribuis al la bildoj tendence tiujn emociojn kiujn la koncerna korpo esprimis.

En tria eksperimento la esploristoj montris al la partoprenantoj vizaĝojn de homoj en diversaj situacioj, ekzemple ĉe entombigo, ĉe suferado de doloroj, ĉe ĝojiga surprizo aŭ ĉe orgasmo. Ankaŭ tie la testantoj ne povis pritaksi ĉu iu travivis en la koncerna momento ion belan aŭ ne. En dua paŝo la esploristoj sekve metis la vizaĝojn en du fotoj al korpoj kiuj suferis trapikon de la cico aŭ kiuj gajnis poenton en teniso. Denove la testantoj atribuis al la vizaĝoj tiun emocion kiun la korpo esprimis.

La esploristoj konkludas el tio ke la vizaĝa muskolaro ne taŭgas por akurate esprimi ekstreme intensajn emociojn. Anstataŭ tio la observantoj interpretas la mimikon laŭ la informo kiun esprimas la korpa sinteno. Malgraŭ tio la homoj submetiĝas al la iluzio legi la emocion ĉefe el la vizaĝo. La esploristoj konstatas: "Tiu procedo ŝajnas okazi aŭtomate ĉar la partoprenantoj ne konscias pri la ambigueco de la vizaĝo kaj pri la vera fonto de la atribuado."

Esperanta Retradio



## Hans SACHS

**Hans SACHS [hans saks] (* la 5-an de novembro 1494 en *Nürnberg*, † la 19-an de januaro 1576 samloke) estis ŝufaristo, majstrokantisto kaj poeto.**

**En Esperanto aperis: *La vaganta studento en la paradiz'; La vulpo kun la kok'; Pri bonaj kaj fiaj gastoj; Eduka sentenco por lia edzino Barbara.***

**Vikipedio**

---

## Mihail SADOVEANU

**Mihail SADOVEANU (naskiĝis la 5-an de novembro 1880 en *Paşcani*; mortis la 19-an de oktobro 1961 en Bukareŝto) estis rumana verkisto, plej konata pro siaj historiaj romanoj.**

**En Esperanto aperis: *Nobela peko; En arbaro Petriŝor; La sciigantoj; La feino de la lago; Malnova historio.***

**Vikipedio**



---



## Bildo de la tago

**Tablo kun seĝoj en *Fira*, *Santorini*, Grekio.**

**Vikipedio**